# BULTENO

## DE LA INTERNACIA LABOR-OFICEJO

**Nº 20** **Novembro** **1926**

Aperas ĉiudumonate kiel aldono al „ESPERANTO“ ☆ Redaktejo: BUREAU INTERNATIONAL DU TRAVAIL, GENÈVE

**TEKSTO:** Belgujo kaj la Okhora Konvencio. — Japanujo kaj la Okhora Konvencio. — Belgujo konfirmas ankaŭ aliajn Konvenciojn. — Germanujo en la Ligo de Nacioj. — La Internacia Labora Organizaĵo kaj la Laboro de Mastroj. — Laborleĝdono en Japanujo. — Senlaboreco en Germanujo. — Statistikoj pri Internacia Migrado. — Konfirmo de Konvencioj. — Germanujo kaj la Rekomendoj pri Maristaj Kodoj kaj pri Asekuro de maristoj kontraŭ senlaboreco. — Enketo pri vivkosto en Japanujo. — La individua produkto de la Rusaj laboristoj. — La vivnivelo. — Striko kaj mastrostrikoj. — Progreso pri konfirmo de konvencioj.

### Belgujo kaj la Okhora Konvencio.

La konfirmo de la Washingtona Okhora Konvencio de la flanko de Belgujo estis registrita de la Sekretario Ĝenerala de la Ligo de Nacioj la 6-an de Septembro 1926.

### Japanujo kaj la Okhora Konvencio.

La diskutoj en la Internacia Labora Konferenco dum la du lastaj jaroj, pri laborhoroj en Hindujo kaj Japanujo, tre influis publikan opinion en Japanujo.

La Japana Asocio por Internacia Labora Leĝdono lasttempe disdonis demandaron pri la konfirmo de la Washingtona Konvencio.

Ŝajnas, ke la respondoj ricevitaj ĝis la mezo de Julio montras, ke, ĝenerale, laboristoj, kleruloj, sociaj studentoj kaj mastroj en maŝinkonstruado kaj similaj industrioj favoras la limigon de laborhoroj laŭ la Konvencio, dum Komercaj Ĉambroj kaj mastroj en la teksindustrioj estas kontraŭaj.

La Asocio intencas post nelonge kunvenigi sian Komisionon pri Problemoj ĝeneralaj por studi la respondojn kaj sekve faros proponojn al la Registaro sur la bazo de la rezultoj de la enketo.

### Belgujo konfirmas ankaŭ aliajn Konvenciojn.

La 19-an de Julio Belgujo registris ĉe la Sekretario Ĝenerala de la Ligo de Nacioj la jenajn konvenciojn, akceptitajn de la Internacia Labora Konferenco en ĝia Tria Kunsido:

- Pri la semajna tagripozo en industriaj entreprenoj;
- Pri la rajtoj de agrikulturaj laboristoj por asociado kaj kombinado;
- Pri la uzo de plumboblanko ĉe pentrado;
- Pri la minimuma aĝo por allasi junulojn al laboro kiel hejtistoj kaj karbordigistoj surŝipe;
- Pri deviga kuracista ekzameno de infanoj kaj junuloj laborantaj surŝipe.

### Germanujo en la Ligo de Nacioj.

La plej grava okazintaĵo en la Sepa Kunveno de la Ligo de Nacioj estis la akcepto de Germanujo kiel membro de la Ligo kaj ĝia elekto kiel konstanta membro de la Konsilantaro, ambaŭ per unuanima voĉdono de la ĉeestantaj nacioj.

Tiuj, kiuj konas la historion de la Internacia Labora Organizaĵo, scias ke Germanujo estas membro de ĉi tiu Organizaĵo jam de la 30-a de Oktobro 1919, kiam ĝi estis akceptita per rezolucio de la Unua Kunsido de la Konferenco kunveninta en Washington, laŭ deziro de la Komisiono pri Laborleĝdono de la Packonferenco kaj decido de la Superega Konsilantaro de la Aliancitoj. Per tiu rezolucio Germanujo estis akceptita „kun la samaj rajtoj kaj devoj kiel la ceteraj membroj de la Internacia Labora Organizaĵo“. Post kelkaj semajnoj, kiam la Administra Konsilantaro de la Internacia Labora Oficejo estis elektata, Germanujo haviĝis seĝon en la Konsilantaro, kiel unu el la ok Ŝtatoj de la ĉefa industria graveco, kaj de tiu tago ĝis nun Germanujo aktive kunlaboras kun la aliaj nacioj en la agado de la Organizaĵo.

Tiuj faktoj estis rememorigitaj dum vizito farita al la Oficejo la 19-an de Septembro de D-ro Stresemann kaj aliaj membroj de la Germana Delegitaro al la Ligo de Nacioj. S-ro Albert Thomas, bonvenigante la delegitaron, esprimis sian plezuron pro tio, ke Germanujo, kiu dum sep jaroj kunlaboris kun la ceteraj Ŝtatoj en la Internacia Labora Organizaĵo, de nun partoprenos en la tuta agado de la Ligo de Nacioj. Li rememorigis la grandan laboron faritan de la Germana Ŝtato en la kampo de socia politiko, laboron pro kiu estis ĉiam neeble eĉ pensi pri internacia labora organizaĵo sen la kunlaboro de Germanujo, kaj li esperis ke tiu kunlaboro fariĝos eĉ pli fruktodona kun la akcepto de Germanujo en la Ligon.

D-ro Stresemann, respondante, diris ke li kaj liaj kolegoj tre ŝatas la fakton ke, eĉ antaŭ la solvo de la grandaj politikaj demandoj, la grandaj demandoj pri la socia paco de la mondo vidis Germanujon kunlaborantan kun la ceteraj nacioj. Ke grandaj klopodoj jam fariĝis en Germanujo por tiu socia paco estas komprenebla. En preskaŭ neniu alia lando la evoluo el memsufiĉa agrara ŝtato al ŝtato de grandaj urboj, laboristoj kaj industrio fariĝis tiel subite kaj rapide ol en Germanujo. Oni povas dubi ĉu tiu disvolviĝo en Eŭropo kaj Ameriko estas gajno por la mondo. Homa individualeco suferas de amasa sugesto kaj amasa psikozo, kaj la transiro de la antikvaj metioj al la hodiaŭaj entreprenoj kun miliardaj kapitaloj riskas produkti sistemon en kiu la homo fariĝos nur parto de maŝino. Ĝuste pro tio estas des pli grave, ke antaŭvidanta socia politiko protektu la interesojn de la Ŝtato kaj de la popoloj kontraŭ la danĝeroj de tiu disvolviĝo. Estas honoro por Germanujo ke, ĉe la komenco de tiu evoluado, ĝi akceptis socian antaŭzorgon kiel unu el la ĉefaj funkcioj de la Ŝtato. Se konkurado fariĝus inter la nacioj en tiu kampo, ne povus esti pli nobla konkurado en nia epoko, kaj estas la tasko de la Internacia Laboroficejo, prepari tian konkuradon. Estas bonega ideo, ke diversaj homoj el diversaj landoj kunvenu ĉi tie por trovi, per sinsekvantaj aranĝoj, tutmondan socian akvolinion, kiu garantios, ke ĉiuj nacioj de la mondo iru, kiel ŝipoj portantaj egalajn ŝarĝojn, kaj ne devu atenti pri la libereco de alia por ekspluati homan laboron. Germanujo jam partoprenis en tiu tasko, kaj D-ro Stresemann esperas, ke nun, kiam ĝia kunlaboro en la plena kunveno kaj konsilantaro de la nacioj estas ĝoje akceptita, ĝia kunlaboro en la agado de la Internacia Labora Organizaĵo, se tio estas ebla, intensiĝos.

## La Internacia Labora Organizaĵo kaj la Laboro de Mastroj.

### Decido de la Juĝistaro pri Internacia Justeco.

La Internacia Labora Konferenco, en sia Sepa Kunsido en 1925, akceptis Projekton de Konvencio pri nokta laboro en bakejoj. La malpermeso de nokta laboro, kiun tiu konvencio enhavas, trafas la laboron de ĉiuj personoj, mastroj same kiel laboristoj.

Dum la diskutoj de tiu temo, en la Administra Konsilantaro kaj en la Konferenco, kaj eĉ poste, duboj estis esprimitaj pri la kompetenteco de la Organizaĵo por reguli la laboron de la mastroj, kaj finfine la demando estis submetita al la Konstanta Juĝistaro pri Internacia Justeco laŭ la jena formo:

„Ĉu estas en la kompetenteco de la Internacia Labora Organizaĵo, redakti kaj proponi laborleĝojn, kiuj, por protekti certajn klasojn de laboristoj, ankaŭ regulas akcesore la saman laboron faratan de la mastro mem?“

La Juĝistaro, en sia dekunua kunsido, post atenta ekzameno de la dokumentoj kaj aŭskultado de la reprezentantoj de diversaj organizaĵoj, respondis tiun demandon jese.

La Juĝistaro opiniis, ke estas klare, el la klaŭzoj de la Packontrakto, ke la Altaj Kontraktantoj intencis doni al la Internacia Labora Organizaĵo tre larĝan povon por kunlabori kun ili rilate al rimedoj por certigi humanajn kondiĉojn kaj la protekton de la laboristoj, kaj ke ne estas imageble, ke ili intencis malebligi al la Organizaĵo la redakton kaj proponon de aranĝoj nepre necesaj por atingi tiun celon. La tuta konstruo de la Parto XIII pravigas la konkludon, ke la Internacia Labora Organizaĵo ne estas malebligita por la propono de aranĝoj por la protekto de salajruloj, tial ke tiuj aranĝoj akcesore regulas ankaŭ la personan laboron de la mastroj. Pro tiuj kaj aliaj motivoj la Juĝistaro esprimis la opinion:

Ke estas en la kompetenteco de la Internacia Labora Organizaĵo redakti kaj proponi laborleĝojn, kiuj, por protekti certajn klasojn de laboristoj, ankaŭ regulas akcesore la saman laboron faratan de la mastro mem.

---

## Laborleĝdono en Japanujo.

La Japana Registaro lastatempe publikigis diversajn leĝojn kaj ordonojn pri laborreguligo.

La 1-an de Julio la Leĝo pri la minimuma aĝo por allaso al laboro en industrio kaj la Leĝo modifanta la leĝon pri Fabrikejoj fariĝis efikaj.

Tiuj du leĝoj konsistigas grandan progreson en Japana socia leĝdono. Rezulte el la modifoj faritaj, la Leĝo pri Fabrikejoj de nun ampleksas 46000 establaĵojn okupantajn 1636000 homojn kaj 896000 virinojn. Interalie, la nova leĝo malplimultigas la laborhorojn kaj pritraktas la malpermeson de nokta laboro por virinoj kaj junuloj, kompenspagon okaze de akuŝo, ktp. La minimuma aĝo por allaso al laboro en industrio estas difinita kiel 14 jaroj anstataŭ 12 jaroj.

Inter aliaj leĝoj akceptitaj, oni povus mencii: la Leĝon pri Arbitracio ĉe Laborkonfliktoj, la Leĝon pri Asekuro kontraŭ Malsano, Leĝon pri Kooperaj Societoj, kaj oni devus ankaŭ aludi certajn Ordonojn pri Minlaboro.

Evidente, Japanujo daŭre progresas sur la vojo de socia reformo. Iom post iom ĝi aplikas la principojn de la Konvencioj de la Internacia Labora Konferenco. Tiurilate, oni povas anonci, ke la konfirmo de la Projekto de Konvencio fiksanta la minimuman aĝon por allasi infanojn al industria laboro estis registrita de la Sekretario Ĝenerala de la Ligo de Nacioj la 7-an de Aŭgusto.

## Senlaboreco en Germanujo.

La senlaboreca krizo, de kiu Germanujo suferas depost la fino de 1925, kaj kiu ampleksas preskaŭ ĉiujn distriktojn kaj ĉiujn industriojn en la lando, ŝajne atingis gravan grandecon.

La nombro da senlaboruloj ricevantaj kompenson, je la fino de Junio, estis 1750000, el kiuj pli ol 200000 estis en Berlino.

La elspezo por la batalado kontraŭ senlaboreco, dum la kuranta jaro, estas taksita je 1500000000 markoj, el kiuj nur unu triono venas de la devigaj kotizoj de mastroj kaj laboristoj. Por laborigi la senlaborulojn, la Registaro preparis grandan programon de urĝaj laboroj, la pliparto de kiuj estos entreprenataj de la fervoja administracio.

La kaŭzoj de senlaboreco, laŭ ĝenerala konsento, estas precipe la granda malpliiĝo de aĉetpovo ĉe la popolo, sekve de la defalo de la antaŭa marko, kaj la tro rapida disvolviĝo de la tielnomataj „raciaj“ metodoj en industrio, kiuj rezultigis amasan maldungon de laboristoj.

---

## Statistikoj pri Internacia Migrado.

La Amerika „Social Science Research Council“ (Konsilantaro por esplorado pri socia scienco) elektis en 1924 specialan komitaton por studi la sociajn efikojn de migraj movadoj. Tiu komitato komisiis al la „Bureau of Economic Research“ (Oficejo pri Ekonomia Esplorado) redakti kompletajn statistikojn pri tiu temo. La Bureau siavice decidis peti la kompetentan fakon de la Internacia Laboroficejo, ke ĝi entreprenu la taskon. Sekve la Migrada Servo de la Internacia Laboroficejo, je la konto de la Bureau of Economic Research, ekzamenis la arĥivojn kaj bibliotekojn de dek Eŭropaj urboj.

En la daŭro de nur dek monatoj, granda maso da materialo estis eltrovita, kun la helpo de sepdek diversaj Ŝtatoj. Statistikoj de Granda Britujo troviĝas jam de la deksepa jarcento, de Germanujo, Francujo, Aŭstrio, Hungarujo kaj Usono jam de la dekoka.

La 15-an de Julio de la kuranta jaro, la Internacia Laboroficejo transdonis al Prof. F. Wilcox, de la Bureau of Economic Reasearch, 540 naciajn tabelojn, ampleksantajn ciferojn por 106 landoj, kaj 35 tabelojn de internaciaj statistikoj. La raporto pri la enketo aperos la sekvontan jaron.

---

## Konfirmo de Konvencioj.

La leganto vidos, ke nia diagramo montranta la progreson pri konfirmo de konvencioj nun, la unuan fojon, ampleksas la konvenciojn akceptitajn en la Kunsido de 1925, kiuj jam komencas rezultigi leĝfaradon. Al Sudafriko apartenas la honoro esti la unua Ŝtato konfirminta unu el la projektoj de konvencioj de tiu jaro, nome la konvenciprojekton pri Egaleco de traktado de eksterlandaj laboristoj rilate al kompenso pro akcidentoj. Svedlando konfirmis la saman konvencion kaj tiun pri kompenso pro akcidentoj. En aliaj landoj la Registaroj rekomendis la konfirmon de tiuj aŭ aliaj konvencioj, kaj leĝoj por efektivigi la decidojn de tiu Kunsido de la Konferenco fariĝis aŭ fariĝas.

Komparo de la diagramo kun la lasta eldono montros notindan progreson pri konfirmo kaj leĝdonado.

---

## Germanujo kaj la Rekomendoj pri Maristaj Kodoj kaj pri Asekuro de maristoj kontraŭ senlaboreco.

La Germana Ministro de Laboro sciigis la Internacian Laboroficejon, ke la Germana Registaro aprobis la Rekomendojn de la Internacia Labora Konferenco pri naciaj maristaj kodoj kaj pri asekuro de maristoj kontraŭ senlaboreco.

Tiuj Rekomendoj estis akceptitaj de la Internacia Labora Konferenco en ĝia dua kunsido en Genova en 1920. La unu celis, ke „per la klara kaj sistema kodigo de la nacia leĝaro en ĉiu lando, la maristoj de la mondo, ĉu dungataj sur ŝipoj de iliaj propraj aŭ de fremdaj landoj, pli bone komprenu iliajn rajtojn kaj devojn." La kodigo de la naciaj leĝaroj estis rekomendita ankaŭ por faciligi la starigon de internacia marista kodo.

Per la dua Rekomendo la Konferenco por certigi la aplikon al maristoj de la Parto XII de la Rekomendo pri senlaboreco, akceptita en Washington en 1919, rekomendis „ke ĉiu Membro de la Internacia Labora Organizaĵo starigu por maristoj efikan sistemon de asekuro kontraŭ senlaboreco rezultanta el ŝipopereo aŭ alia kaŭzo, ĉu per ŝtatasekuro, ĉu per ŝtatsubvencioj al profesiaj organizaĵoj kies reguloj ebligus la pagon de kompenso al senokupaj membroj."

## Enketo pri vivkosto en Japanujo.

La Japana registaro intencas fari enketon pri la kosto de vivado, enketon kiu ampleksos la periodon de la 1-a de Septembro 1926 al la 31-a de Aŭgusto 1927.

Informoj estos serĉataj de familioj apartenantaj al diversaj klasoj de laboristoj, manaj kaj nemanaj, en diversaj lokoj. La familioj estos elektataj kun la helpo de la registaraj kaj komunumaj oficejoj, komercaj ĉambroj, dungoficejoj kaj mastraj kaj laboristaj organizaĵoj.

Oni esperas kolekti sciigojn de pli ol 7000 familioj, konsistantaj el de 2 ĝis 7 personoj. Nur familioj, kies ĉefo provizas pli ol duono de la tuta enspezo, estos selektataj.

La informoj serĉotaj ampleksos la konsiston de la familio, ĝiajn enspezojn, elspezojn kaj loĝadon.

## La individua produkto de la Rusaj laboristoj.

S-ro Kaplun, Estro de la Departemento pri laborprotekto de la Unuiĝo de Socialistaj Sovjetaj Respublikoj, en raporto prezentita al la Centra Konsilantaro de Rusaj Sindikatoj lastan Junion, diras, ke ekstralaboro estas tre ofta, malgraŭ la fakto, ke ekzistas pli ol miliono da registritaj senlaboruloj. La semajna ripozo estas ofte preterlasata, kaj la nombro da akcidentoj, mortigaj kaj aliaj, konstante pligrandiĝas, kaŭze de malatento, manko de ŝirmiloj kai senefika organizo.

Tiu oficiala bildo de laborkondiĉoj en Rusujo frapante konfirmas raportojn lasttempe faritajn ĉe diversaj sindikataj kongresoj. Ŝajnas, ke la metallaboristoj, konstrulaboristoj, fervojistoj, ministoj kaj tekslaboristoj estas malkontentaj pri la nunaj kondiĉoj. Oni plendas pri troa laboro, nesufiĉaj salajroj, manko de loĝado, malesto de antaŭrimedoj kontraŭ akcidentoj, difekta ilaro kaj nesufiĉa inspektado. Estas kompreneble ke, en tiuj cirkonstancoj, la laboristoj iom koleras kontraŭ la konstanta insisto pri pli granda individua produkto, kaj ke la Centra Konsilantaro de Sindikatoj, aŭskultinte la raporton de S-ro Kaplun, deklaris, ke individua produkto povas esti pliigata nur per plibonigo de laborkondiĉoj.

## La vivnivelo.

Kiu estas la vivnivelo de iu socia klaso, en difinita lando, en difinita momento? Respondo al ĉi tiu demando estas necesa por ebligi komparadon kun la vivnivelo de alia klaso, aŭ de la sama klaso en alia lando, aŭ kun la vivnivelo de la klaso mem en iu pasinta momento.

Tiaspecaj komparadoj fariĝas, ne nur de sociologiistoj, sed ankaŭ de mastroj kaj laboristoj, diskutante kondiĉojn de kolektivaj kontraktoj.

Ĉu la pli altaj nominalaj salajroj en certaj landoj ebligas la salajrulojn ĝui pli altan vivnivelon, aŭ ĉu ili nur respondas al pli altaj prezoj? Ĉu la salajroj postulataj de la laboristoj, dum periodo de altiĝantaj prezoj ĝuste kompensas la pliiĝon de la prezoj por la komercaĵoj konsumataj? Respondoj al tiuj demandoj nur estas eblaj, se statistikoj ekzistas montrantaj, kiel la familiestro starigas sian budĝeton, kiel li elspezas sian enspezon, kion li aĉetas kaj kiom?

Tiaspecaj statistikoj ekzistas, sed ili estas malfacile kompareblaj, ĉar ili estas starigataj laŭ diversaj sistemoj. Tamen la Internacia Laboroficejo ĵus eldonis studon pri Metodoj por fari enketojn pri familiaj budĝetoj (Studies and Reports, Series N, No 7; Etudes et dokuments, Série N, No. 7), en kiu oni klopodis por kompari kaj kunordigi la uzatajn metodojn.

## Striko kaj mastrostrikoj.

Konfliktoj inter mastroj kaj laboristoj en industriaj entreprenoj, kun uzo de la striko aŭ mastrostriko kiel armilo de unu aŭ alia batalanto, rezultigas ĉiujare perdon de multaj laborhoroj por la koncernataj landoj. Estas plej grave, ke la ŝtatisto, kiu volas antaŭforigi tiajn konfliktojn, kaj la studantoj de iliaj ekonomiaj kaj sociaj sekvoj, havu la plej kompletajn informojn pri ilia ofteco kaj graveco.

Rilate al asekuro kontraŭ senlaboreco, asekuro tiom disvolviĝinta dum la lastaj jaroj kaj nun ekzistanta en deksep landoj, oni povas nur konjekti, kiuj kotizoj estos necesaj, se oni ne havas certajn statistikojn pri laborkonfliktoj kaj precizajn sciigojn pri la rilatoj inter ekonomiaj kondiĉoj kaj la nombro da konfliktoj.

Ankaŭ se statistikoj ekzistas, estas ofte malfacile utiligi ilin, tial ke ili estas starigitaj laŭ tre diversaj sistemoj. La Internacia Laboroficejo ĵus eldonis studon pri Metodoj por starigi statistikojn pri laborkonfliktoj (Studies and Reports, Series N, No. 10. Etudes et documents, Série N, No. 10) en kiu oni fine klopodas por fiksi difinitajn regulojn.

